reciproka estimo kaj ŝato, al internacia amikiĝo, kaj al paco. Kiel reala estas tio ĉi? Kiel fortaj estas ĉi tiuj influoj, kompare kun la malaj influoj kiujn efikigas sur nin la propagandistoj de la militpreparo? Kun bedaŭro mi devas konstati ke la kontraŭpezo al ĉi tiu propagando, eĉ sur la esperantistoj mem, estas tre malgranda, dum por neesperantistoj ĝi estas praktike nula. *Amerika Esperantisto* kaj *El Popola Ĉinio* ambaŭ pentras per blanko kaj nigro, kun nur tiu ĉi diferenco, ke tio kion unu el ĉi tiuj gazetoj nomas blanka, laŭ la alia estas nigra, kaj inverse. Sendube la naciaj Esperanto-gazetoj ne estas taŭgaj por ludi rolon kiel kontraŭpezo. Eble ke internaciaj gazetoj, kiel Esperanto Internacia, La Praktiko, Heroldo de Esperanto kaj Sennaciulo iel povus helpi. Sed povas esti nenia dubo pri tio ke la tasko estus treege malfacila. La redaktoroj ja ne povas kontroli la ĝustecon de la informoj. Tiuj informoj devus veni de esperantistoj en la diversaj landoj, kaj devus koncerni nur tion, pri kio la informantoj scias el propra sperto. Informoj el iliaj nacilingvaj gazetoj, ĝenerale, estus senvaloraj, ĉar ilian fidindecon dubindigas la propaganda elemento. Kaj oni ne forgesu ke eĉ proprajn spertojn oni rigardas tra okulvitroj koloritaj; ja la interpreto de la spertoj tre varias laŭ tio, ĉu oni favoras al la reĝimo, aŭ kontraŭas al ĝi. Kaj do, por esti taŭge informita pri la vivo de la homoj en iu lando, oni bezonas informojn pri personaj spertoj de diversopiniaj homoj. Ja pri salajronivelo kaj kostoj de vivado oni povas sufiĉe objektive informi, ĉar tie temas pri mezureblaj aferoj, esprimeblaj per nombroj. Sed kiam temas pri ĉiaspecaj liberoj, rajtoj, kaj devoj de la civitanoj, ktp., do pri „kvalitoj", pernombraj esprimoj ĝenerale jam ne estas aplikeblaj, kaj komparoj inter diversaj landoj fariĝos tre malfacilaj. Kaj tie certe ne finiĝas la malfacilaĵoj. Ĝuste tie, kie civitanaj liberoj apenaŭ ekzistas, estas tre danĝere kaj por la individuo, kaj por la Esperanto-movado perletere informi pri la situacio en kiu vivas la homoj en tia lando. Plia malfacilaĵo estas, ke eble legantoj ŝokiĝas, se iu nomas blanka tion, kion li opinias, pro la informoj en sia nacia gazetaro ktp., nigra. Tamen, malgraŭ ĉiuj ĉi tiuj malfacilaĵoj, eble Esperanto kaj kelkaj ĝiaj internaciaj gazetoj povus iomete helpi al pli bona informado pri vivkondiĉoj en diversreĝimaj landoj. Ĉe tio gravas ne nur komparo de ĉi tiuj diverslandaj vivkondiĉoj, gravas eĉ pli la demando ĉu la vivkondiĉoj en iu lando pliboniĝas, aŭ male, kaj ĉu la homoj ĝenerale kontentas, aŭ sentas sin sub netolerebla jugo. Kaj se, ekzemple, la plimultaj ĉinoj preferus la reĝimon de Maŭ Ze-tung ol tiun de Ĉang Kaj-ŝek, do kiu rajtus klopodi trudi al ili tamen tiun ĉi lastan? Kaj kion signifas indigniĝi, se iu ĉino esprimas sian opinion, ke nun la ĉina popolo estas liberigita de ĉinaj kaj de fremdaj parazitoj kaj subpremantoj? Se ĉi tio estas la sincera opinio de la informanto, ni estu dankaj pro ĉi tiu informo.

Ŝajnas ke ni devas konkludi ke la ebla porpaca influo de Esperanto — almenaŭ sub la hodiaŭaj kondiĉoj — estas ege malforta. Tamen, kio ŝajnas ankoraŭ entreprenebla, estu entreprenata!



## PACO KAJ VALUTO.

Prelego de registar-direktoro d-ro NÖLLE (Koblenz) dum la 25a SAT-kongreso en Düsseldorf.

Gekamaradoj!

Antaŭ kelkaj monatoj aŭ semajnoj mia malnova amiko profesoro Rissom el Hamburgo skribis al mi, ke li anoncis min al la SAT-kongreso en Düsseldorf, por ke mi prelegu pri la temo: „*Paco kaj Valuto*", kvankam mi ne scipovis Esperanton. Tial mi do devis tre rapide eklerni vian lingvon, pardonu: nian lingvon. Do bonvolu pardoni miajn erarojn, ĉar mi ja estas novebakita Esperantisto. Mi estas feliĉa pri la fakto, ke mi estas la sola persono ĉi tie, kiu ne estas devigata aŭskulti mian balbutatan prelegon kaj miajn erarojn.

D-ro Zamenhof diris:

„La popoloj ankoraŭ ne interkompreniĝas kaj kondutas reciproke kiel fremduloj kaj vivas kune en reciproka malamikeco, ĉar oni ja ne komprenas unu la alian pro diverseco de la lingvoj. Estus paco" tiel li esprimis, kaj ankaŭ la urbestro de Düsseldorf, s-ro Gockeln antaŭ tri tagoj, „estus paco, se la diversaj popoloj sin bone konus kaj tiel vidus, ke la alilandanoj estas samtiaj homoj kiaj ili mem. Do oni povas aboli per interpopola komprenilo malamon kaj malamikecon."

Certe: la divers-lingveco estis kaj estas unu kaŭzo de tiu malamikeco. Tial la mondhelp-lingvo, la Esperantomovado povos ludi gravan rolon tre vastan. Sed nun ni vidas la nepriskribeblajn sekvojn de du militoj kaj malgraŭ tio ankoraŭ ni vivas en epoko, dum kiu oni rigardas ĉion el vidpunkto de profito kaj milit-armado. La opinio de d-ro Zamenhof estas ĝusta, sed oni devas kompletigi ĝin, ĉar nur unu sama lingvo interpopola ne sufiĉas por definitive eviti militojn.

Mi rememorigas la militon antaŭ 90 jaroj inter Prusio kaj Aŭstrio, kvankam ambaŭ partioj militintaj parolis la saman gepatran lingvon; kaj samtempe la militon inter la nordaj kaj sudaj ŝtatoj de Usono. En la nuna jarcento intermilitis du sudamerikaj ŝtatoj, kvankam en ambaŭ oni parolis hispane. Hodiaŭ oni jam pensas pri tria mondmilito, dum kiu Germanoj batalus kontraŭ Germane-parolantoj.

Do: Esperanto sendube estas necesa, se oni volas eviti militojn, sed Esperanto ne sufiĉas por konservi la pacon, ĉar militoj havas certajn kaŭzojn ekonomiajn aŭ valutpolitikajn. Ĝis kiam tiuj kaŭzoj estos ekstermitaj, ni ĉiuj vivas kaj vivos en la minacanta danĝero de ĉiutempe eksplodebla nova milito.

El la gazetaro Esperantista mi vidis, ke la anoj de Karl Marx kaj la anoj de Silvio Gesell ne samopinias. Ni ne bezonas malĝoji pri tiu diferenco kaj malkonkordo; kontraŭe: estus tre enue, se ni, Esperantistoj, ĉiam kaj ĉie senescepte havus la samajn vidpunkton kaj opinion.

Sen dubo la jena ĝustas: se la valutbanko eldonas tro multe da mono, la prezoj altiĝas. Tial ĉiu aĉetas kiel eble plej rapide. Tiam la mono bone kaj rapide cirkulas kaj ĉiam instigas al novaj demandoj en la ekonomio. Tial ne ekzistas senlaboreco. Ekzemplo estas Germanio en la jaro 1920, kiam regis inflacio kaj ne ekzistis senlaboreco, kvankam Germanio perdis la militon.

Kontraŭe: se la valutbanko eldonas tro malmulte da mono, la prezoj malaltiĝas. Tial ĉiu aĉetas malrapide, la komercistoj kaj fabrikoj ne havas debiton kaj la senlaboreco pligrandiĝas. Ekzemplo estas Germanio en la jaro 1932, tiutempe ĝi havis ses milionojn da senlaboruloj. Pli malfrue ni vidos, ke inflacio kaj deflacio, precipe deflacio, estas la kaŭzoj de militoj, ĉar la ŝanceliĝoj de la valuto produktas senlaborecon kaj maljuston kaj koleron, kaj maljusto kaj senlaboreco lastkaŭze estigas militon.

Flanke mi volas esplori kontraŭdiron: militoj ne estiĝas per valutaj manipulacioj, sed per troa popolado de la terglobo. Eble sufiĉas nur du punktoj por refuti la kontraŭdiron.

Unue: En la lasta jaro la kongreso de mondkonataj kemiistoj en Londono konkludis, ke la terglobo povas nutri ne nur 2 miliardojn da homoj kiel nuntempe, sed eĉ 8 miliardojn, do kvaroble tiom, kiom nun.

Due: Granda marksisto Germana, August Bebel, eldonis antaŭ 70 jaroj libron kun la titolo: „La virino kaj la socialismo". En ĝia lasta ĉapitro li diras: „Apud la du bordoj de la sudamerika rivero Orinoko kreskas tiom da palmoj, ke oni povus havigi per iliaj kokosnuksoj la necesan grason al la tuta homaro."

Oni povus formi multajn tiuspecajn ekzemplojn por pruvi, ke la homaro ne suferas per mizero, sed suferas per abundo. Tial oni ja bruligas tritikon kaj kotonon kaj ŝutas kafon en la maron.

Mi estas firme konvinkita, ke la mondo sufokiĝas pro abundo, ke povas esti paco inter la popoloj, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj kaj lim-impostoj, kiuj malebligas al ili, libere interkomuniki kaj libere interŝanĝi varojn.

La kontraŭdiro, ke troa popolado kaj la malhavo de nutraĵoj estas la kaŭzoj de militoj, do estas refutita [1]).

Mi ne dubas unu momenton, ke vi supozas min esti nejusta kaj neobjektiva, ĉar mi tute ne menciis la teoriojn troproduktadajn kaj krizajn de Karl Marx, kiujn li en tiom detala kaj interesa maniero klarigis al la tutmonda laboristaro. Sed bonvolu konsenti kun mi en la jeno: tutcerte ne estas unu aŭskultanto ĉi tie, kiu ne ekzakte konas tiujn teoriojn. Kial mi do prelegu ion konatan, se mia temo ja estas: „Paco kaj valuto", kaj sekve mi estas limigita en la amplekso de mia parolado?

Ankaŭ la orovaluto estas kaŭzo por militoj, tial la disputado pri la orovaluto estas necesa por la temo. Se la oro estas la pag-rimedo en iu ajn lando aŭ estas bezonata por la sekuro de la cirkulanta paper-mono, kompreneble ĉiu lando kun oro-valuto alcelas elaĉeti kiom eble plej multe da oro en la eksterlando kaj importi en la propran landon. Tiu avido pro la malmulto da ora sekuro kaŭzas diferencojn inter la landoj kun oro-valuto. Plue: la oro aĉetata devas esti pagata per devizoj; por povi konservi la devizojn, kiom eble plej multe da varoj devas esti eksportataj eksterlanden. Tiel ni vidas kaj konstatas, ke ĉiuj landoj kun oro-valuto daŭre provas pligrandigi siajn eksportaĵojn. La ŝtatoj sukcesas per tio ke ili donacas eksport-premiojn, malplikostigas la transport-tarifon ĝis la limo kaj favorigas la eksportantajn entreprenojn per malaltigoj de la impostoj. Kaj samtempe ili malhelpas la importon de varoj el la eksterlando, precipe per lim-impostoj.



Tiuj lim-impostaj muroj, kaŭzitaj per la nepraj necesoj de la oro-valuto, ankaŭ ofte estas, eĉ se kaŝite, la kaŭzoj de militoj. Tiu dirita fakto estas pruvita per tio, ke laŭ la pac-kontraktoj de la venkintaj ŝtatoj estas malpermesite al la venkitaj ŝtatoj preni limimpostojn por varoj importataj el la venkintaj ŝtatoj.

La sama validas por la aŭtarki-aspiroj, do por la tendencoj, fari sin mem kiom eble plej sendependa de importaĵoj el la eksterlando. Tiaj ŝtatoj do klopodas, importi kiom eble plej malmulte da varoj por ŝpari la devizojn por la pagado de importenda oro. En ŝtatoj kun orovaluto oro estas mono, kaj mono estas kiel la sango en la korpo la pulso de la ekonomio. Tial oni ne povas vivi sen oro. Se la aliaj posedas la oron, oni lastfine volas militojn kontraŭ la aliaj [2]).

Komence mi forgesis principe diri la jenon: Mi tute ne intencas konvinki kaj persvadi nur unu solan inter vi per mia traktaĵo, mi nur deziras, instigi kaj inspiri vin, por ke vi mem okupu vin per valutaj problemoj kaj iom pripensu la interesegajn demandojn en via libertempo.

Kiel vi aŭdis intertempe, mi estas nove-bakita Esperantisto, sed mi estas tre malnova eksperto de valutaj teorioj. Mi estis membro de la valut-teknika seminario de la fame konata profesoro d-ro Knapp en Strassburg. El la vidpunkto de tiu seminario mi okupis min jam kvardek jarojn pri valutaj demandoj kaj konas — parte persone — la plej bone konatajn valut-teoriulojn, ekz-e profesoron Gustav C a s s e l el Svedio, profesoron Irving F i s h e r el Usono, Silvio G e s e l l el Germanio kaj kompreneble Karl M a r x kun lia krizoteorio.

Tri personoj — unue la granda industrimagnato el Bremen, d-ro R o s e l i u s, la posedanto de la Kafo-Hag-Fabrikoj, due la alta generalo d-ro Barono de S c h ö n a i c h el Hamburgo, trie la aŭstria profesoro kaj ekspastro d-ro U d e el Graz — atingis en siaj publikaĵoj la saman rezulton unu sendepende de la alia:

**„La milito estiĝas per la rentumo!"**

Tiu frazo do atestas, ke militoj estiĝas pro valutaj kaŭzoj. Unu ekzemplo: antaŭ la unua mondmilito la riĉuloj en Germanio nur povis plasi la monon je ĉirkaŭ ses procentoj da rentumo. Sed la Bagdad-fervojo en Turkio proponis akciojn kun dekkvin procentoj. Estas kompreneble, ke Francio, Anglio kaj Germanio avidis al tiuj akcioj. Laŭ la konvinko de multaj ekspertoj estiĝis per tio diferencoj inter la nomitaj landoj. Kaj tio (la akcioj kun 15 procentoj) estis unu el multaj kaŭzoj pro la unua mondmilito [3]).

Dua ekzemplo: La antaŭe menciita abundo de varoj malaltigas la rentumon. Tial la kapitalistoj klopodas forigi tiun abundon ankaŭ per militoj, por ke ili reĝuu senlaboran profiton. La soldato ne nur mortigas, sed ankaŭ detruas varojn kaj abundon.

Oni povus aldoni ankoraŭ multon pri la temo „Paco kaj Valuto". Mi prenas ankoraŭ jenan ekzemplon:

En la Cara Rusio ekzistis proverbo: „Pli volonte granato trans la Vistulon ol bombo antaŭ la Isaak-katedralo en Petersburgo".

La proverbo mallonge esprimas: pli volonte milito ol revolucio. Ekzemplo estas la rusa-japana milito komence de la nuna jarcento: En Rusio ekzistis pro valutaj manipulacioj krizo, senlaboreco, mizero, kaj malkvieto, kolerego de la laboranta klaso. La rusa registaro tiutempe evitis la minacantan revolucion per la menciita milito, ĉar ĉiam kaj ĉie eta grupo da potenculoj decidis pri la alternativo ĉu milito aŭ paco. Nur infinitezima minimumeto de la homaro celvolas la militon kaj estas la tragiko de la homa gento, ke ĝi kvazaŭ fermento en la malkompono de la homa kulturo ĉiam kaj ĉie malfiaskas.

Estus tre interese elesplori la faktojn, kiuj nepris Usonon eniri la unuan kaj duan mondmilitojn: sendube registaro, kiu havas dekdu milionojn da senlaboruloj rigardas la militon sola rimedo por eskapi la krizon kaj eviti la ekonomian, jam delonge minacantan, danĝeron de ŝtata bankroto. Por mencii aktualan ekzemplon: Germanio havas nun pli ol unu milionon da senlaboruloj. Vi permesu al mi ripeti la novaĵojn el la gazetaro: „La registaro germania kaj la industri-estroj opinias ke oni nur povas aboli la senokupecon per rearmado." Tio signifas preparon al la venonta tria mondmilito.

Certe en ĉiu lando ekzistas proletoj kaj riĉuloj, ekspluatantoj kaj ekspluatatoj. La anoj de Karl Marx diras, ke la fabrikposedantoj estas la ekspluatanta klaso. Ni taksu tiun ekspluatadon en Germanio ĉiujare eble tri ĝis kvin miliardoj da markoj. La anoj de la moderna valut-teorio, interalie Silvio Gesell, supozas la ekspluatadon kaŭzitan per la kapital-rentumo, en Germanio ĉiujare ĉirkaŭ dudek miliardoj da germanaj markoj. Cetere tion konstatis fame konata profesoro kaj eksministro, la direktoro de la „Germana Banko" d-ro Helferich jam por la jaro 1912.

Kiel ajn estas: ekzistas en ĉiu lando
riĉuloj kaj proletoj,
rajdantoj kaj ĉevaloj,
ekspluatantoj kaj ekspluatatoj,
laborantoj kaj ĝuantoj.

El tiu du-partigo de la popoloj estiĝas la reciproka potencaspiro de la du kontraŭulaj, malamikaj klasoj. La laboristaro volas liberigi sin el la kapital-rentumaj katenoj, dum la kapitalistaro volas plue teni la laborantajn homojn en la nuna stato. El tiuj cirkonstancoj kreskas la spirito de la sociala malpaco kaj la funda kaŭzo de la interpopola milito.



La milito estas laŭleĝa infano de la socialaj diferencoj, de la valuto, de la rentumo kaj de la ŝanceliĝoj de la valuto.

La sankta Tomaso de Aquino diris:

*„Tene te primo in pace et tunc alios pacificare poteris."*

*„Unue tenu vin mem en paco, kaj nur tiam vi kapablas vere pacigi la aliajn."*

Tio signifas en moderna lingvo:

Nur tiuj popoloj vere povas vivi en reciproka paco, kiuj posedas en siaj propraj landlimoj la intercivitan pacon, tio estas, kiuj solvis definitive la socialan problemon. La sociala paco estas la fundamento de la interpopola paco.

Kelkaj kritikaj notoj de la Redaktoro:

---

1) Oni memoru tamen, ke, kvankam la mondo kiel tuto ankoraŭ ne estas tro popolita, kaj *povas* ankoraŭ disponebligi al ĉiu homo kaj al ĉiu popolo sufiĉe da nutraĵo, tamen ekzistas — flanke de preskaŭ malplenaj kontinentoj, kia ekzemple estas Ameriko — regionoj kaj landoj fakte jam (preskaŭ) tro popolitaj, ekz. Japanujo, Javo, Nederlando kaj Belgujo. Ĉi tiuj diferencoj, parte kaŭzitaj de limigo kaj malpermeso de enmigrado en la ankoraŭ maldense loĝataj landoj, sendube ankaŭ efikas kiel kaŭzoj militaj.

2) Sendube estas vere ke la ŝtatoj strebas kiel eble pligrandigi sian eksporton kaj malgrandigi sian importon. Oni rigardu ekzemple Usonon, la solan landon en la mondo kiu dronas en oro, kies orprovizo sendube pli ol sufiĉas kiel sekuraĵo por ĝia mono, kiu tamen daŭrigas la amasigadon de oro en la fortikaĵo *Knox* malgraŭ tio ke fakte oni jam havas tro. Usono ĉiam denove cedas al la postuloj de iuj el siaj industrioj kiuj insistas ke importo jen de fromaĝo, jen de butero, jen de horloĝoj, jen de aliaj fremdlandaj produktitaĵoj konkurantaj en la Usona merkato kun enlandaj produktaĵoj, estu malhelpata aŭ eĉ leĝe malpermesata. Tio ne povas ne havi malfavoran reefikon sur aliaj Usonaj industrioj kies eksporto al la eksterlando pro tio malpliiĝas, sed spite al la evidenteco de tio oni plu faradas tiajn stultajn aranĝojn kiuj solvas neniun el la malfacilaĵoj. La kaŭzo — almenaŭ en ĉi tiu kazo — nepre ne estas ke Usono tiel urĝe bezonas oron. La kaŭzo estas ke en la „riĉa" Usono la civitanoj ne disponas pri sufiĉe da aĉetopovo por aĉeti tiom kiom ili kune produktas. Tio instigas Usonon kaj ĉiujn aliajn „kapitalismajn" landojn eksportadi la enlande ne aĉeteblan surpluson. Tio instigas Usonon al armado kaj milito, ĉar por tiaj celoj „decas" amasigi sur la nacion novajn ŝuldojn. Tio, ankaŭ, igas Usonon plu aĉeti oron, ĉar la oron elfositan en Sud-Afriko kaj aliloke kaj importitan en Usono, oni entombigas en la fortikaĵon *Knox*. La importita oro maskas ekvivalentan mankon de aĉetopovo, ĉar ja tiu oro ne aperas en la merkato kaj ne bezonas esti aĉetata de la civitanoj. Tial oro estas la sola importaĵo vere bonvena. Ĝi ne estas utilaĵo. Ĝi ne kontribuas al nia ĝena riĉo! Bedaŭrinde nur, ke ni ne povas produkti da ĝi senlimajn kvantojn, por ke ĝiaj produktantoj akiru aĉetopovon por aĉeti parton el la utilaĵoj produktitaj de aliaj. Tamen, pli racia solvo estas ........... simple distribui tiun — evidente necesan sed mankan — aĉetopovon, ne intersimple distribui tiun — evidente necesan sed mankan — aĉetopovon, ne inter-
ligante ĉi tiun distribuon kun la produktado de kia ajn ne-utilaĵo, kiel proklamas la socikreditanoj. Evidente por la nuna homaro ĉi tiu solvo estas ankoraŭ tro racia. Ja ĉi tiu manko de aĉetopovo en 1929 ĵetis Usonon kaj la mondon en la krizon. Ĉi tiu sama manko de aĉetopovo minacas ĵeti Usonon

kaj la mondon denove en krizon, kaj estas antaŭsignoj kiuj kredebligas ke eble ankoraŭ en ĉi tiu jaro.

[3]) Kvankam realigo de la proponoj de Gesell sendube malsuprenigos ĝis nulo aŭ eĉ sub nulon la malsupran limon de la poo de interezo (rentumo) determinitan de la kvalitoj de la *mono*, kaj tiel ebligos ke iom post iom la poo de interezo reduktiĝos al nulo, ĝi per si mem ne nuligos la poon de interezo, kiu ja ankaŭ dependas de la (mal)abundeco de la kapitalo. Kaj la monreformo ankaŭ ne malebligos ke — almenaŭ dum kelka tempo — iuj investoj liveros pli altan procenton, kiel okazis ĉe la Bagdad-fervojo.

007.008.04
342.25

## LA HAVADO DE LA GUSTA MEZURO

de s-ino E. V. HATTERSLEY (Britujo),

kun permeso de la aŭtorino tradukita de la redaktoro el *„Practical Aspects of Social Credit"*, eldonaĵo de la Socikredita Kunordiga Centro, Mexborough, 1951.

Antaŭ multaj jaroj mi legis eseon de profesoro Haldane, titolitan *„On Being the Right Size"* (Pri Ĝustmezureco). En tiu eseo Haldane montris kiel la gigantaj kreaĵoj el antaŭhistoriaj tempoj estis ĝustmezuraj en la cirkonstancoj tiutempaj, kiam la varma malseko stimulis la egan kreskon en la praaj arbaroj kie ili nutriĝis. Sed ili ne plu estis ĝustmezuraj en malpli varma mondo kun malpli abunda disponigo de nutraĵo. Tiaj kreitaĵoj, nekapablaj sin adapti, malaperis.

Sekvis tion ekzamenado de la mezuroj de diversaj kreitaĵoj hodiaŭaj, kun klarigoj kial la anoj de ĉiu unuopa specio, vivantaj sub similaj kondiĉoj, emas atingi, meze, proksimume tiun mezuron kun kiu ni konas ilin. Por la celoj de iliaj vivoj ili estas ĝustmezuraj, kaj la Naturo zorgas pri tio, ke ili restu tiaj.

Koncerne la homon, Haldane ekzamenis la fabelojn pri la rasoj de gigantoj kaj grandeguloj vivintaj, laŭ tiuj fabeloj, en tre malproksimaj tempoj laŭ manieroj pli noblaj ol estas niaj hodiaŭaj vivmanieroj. Li montris ke kia ajn giganto du kaj duonan metrojn longa nepre estus invalidulo, kiu ne povus stari ne tuj renversiĝante. La aranĝo de la homa korpo neniel povus subteni strukturon el karno, sango, ostoj kaj tendenoj 2,5 m longa en rektstara pozicio. La fortega giganto desegnita en la porinfanaj libroj, kun Fingruleto sur sia manplato, estas meĥanika neeblaĵo.

Malfeliĉe, dum la Homo mem, koncerne la nombron de la centimetroj de sia longo, estas limigita de la Naturo, kaj tial ĝenerale atingas proksimume la ĝustan mezuron, ne ekzistas tia aŭtomata kaj bonfara diino gardanta pri la kreaĵoj de la senripoza cerbo de la Homo. La origina instigo al la homoj pliigi la efikecon de sia laboro per kunlaborado en grupoj por havigi al si la materiajn bezonataĵojn ŝajnas neĉesipova. La grupoj ariĝis en pli grandaj or-



ganizaĵoj, ĉi tiuj organizaĵoj siavice kunfandiĝis je trustoj kaj monopolaĵoj, kaj, antaŭ la milito, la apartaj naciaj monopolaĵoj rapide kuniĝadis en tutmondajn kartelojn kiuj sin rigardis kiel ekster kaj super la ŝtataj registaroj. Ĉi tiu ideo ke la pli granda estas nepre la pli bona, disvastiĝis de la kampo de la produktado al tiuj de Komunuma Regado, de Nacia Prizorgado de Saneco, de Instruado kaj Edukado.

En ĉiu etapo de ĉi tiu disvolviĝo la unuopa homo forcedas iom pli de sia dispono pri fina decido, kaj per kaj pro tio perdas iom de sia mensa staturo. Kiu prenas la respondecon de li forprenitan? Parto iras al la gvidanto de la grupo, parto al la estroj de la organizaĵo kies parto la grupo estas, kaj tiel la supro regas la tutan politikon kaj lasas al la ĉefoj de la unuoj el kiuj ĝi iras por esti farata. Kaj ju pli granda estas la fina organizaĵo, des pli plene la supro regas la tutan politikon kaj lasas al la ĉefoj de la unuoj el kiuj ĝi konsistas, respondecon nur pri la plej aŭtomata ĉiutaga rutino.

Ja mensaj gigantoj efektive devas esti tiuj, kiuj estras la potencajn organizaĵojn kiujn la Homo, kvazaŭ malgraŭ si, ŝajne ne povas ne konstrui! Ĉu ili vere estas? Kiu metis ilin tien? En kiuj ekzamenoj por provi ilian taŭgecon por la oficoj kiujn ili tenas, sukcesis ili? Ĉu ne estas pli verŝajne ke ili simple alvenis tien pro sia propra potencavido, helpite de la najloj en la plandumoj de siaj botoj, kaj de la akreco de siaj kubutoj?

Efektive, la homoj kiuj sukcesis atingi la hodiaŭajn regajn poziciojn ne multe diferencas, kaj malofte estas pli dotitaj per talentoj ol ni, krom en unu rilato: ke il amas potenci. Tamen, por fari la mil kaj mil gravajn decidojn kiujn ĉiu tago postulas de ili, surbaze de donitaĵoj senditaj de malproksime kaj pro neceso mallongigitaj kaj koncizigitaj, koncernantajn eble tipon de persono fremdan al ili, vivantan kaj laborantan en cirkonstancoj kiujn povas koni kaj kompreni nur tieuloj, bezoniĝas superhomoj. Fakte, la pli multaj el la decidoj farendaj estas farataj per simpla ekzamenado de tio, kion oni faris la lastan fojon en simila kazo, sekvata de sama faro. Estas malfacilege enigi novan ideon en ĉi tiujn tre kompleksajn, el malproksima supro regataj organizaĵoj.

Ĉu ekzistas ia speciala kialo por tiu ĉi ega elefantiazo en nia socia kaj industria vivo? Mi ne kredas, ke mi troigas la analogiigon, komparante nian financan sistemon kun la glandoj kiuj en la homa korpo stimulas kreskon, kaj kiuj, se malsanaj, povas kaŭzi monstran kreskon. Kun la disvolviĝo de la industria erao, la fluo de mono pli kaj pli direktiĝis al la disvolvo de la granda, kaj ĉiam pli granda unuo, kaj atingis la malgrandajn entreprenojn ĉiam pli malfacile. La entreprenon de la malgranda aferisto eble konas, kiel kontentige sanan, lia loka bankestro; ĝi ne estas, tamen, sufiĉe granda por ke estu informita pri ĝi la banka ĉefoficejo. Kiam mono por esploro kaj disvolvo estas bezonata, sendube ĝi iros al tiu entrepreno — aŭ ĉeno de entreprenoj — kiu havas tutnacie konatan nomon. Sendube en tempoj de ne-